



L[★]umo

Julio 2026

*La montreala klubo
je vojkruciĝo*

*Amikeco kaj Aventuroj:
Mekaro 2026*

*VARIE prezentis la
riĉecon de Peruo*

Kiu Estas...?
Guy Matte





Lumo estas la oficiala Esperanta revuo de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kaj Esperanto-Societo Kebekia (ESK), kiuj antaŭenigas Esperanton en Kanado.

*Sekvu la lastajn novaĵojn de
Esperanto Kanado*



Kanada Esperanto-Asocio

Estraranoj:

Geoffrey Greatrex (Prezidanto)

Bob Williamson (Sekretario)

Garry Evans

Andrew (Andreo) Sly

Luis Obando

Trefleo Mercier

Jordan Zero

Ĵenja Amis

John Huang

Esperanto-Societo Kebekia

Estraranoj:

Normand Fleury (Prezidanto)

Sylvain Auclair (Sekretario)

Rafael Scapin

Garry Evans

Ĵenja Amis

Zdravka Metz

Redaktoroj: Garry Evans, Luis Obando

Dezajno: Daniela Obando

Enpaĝigo: Daniela Obando, Luis Obando,
Viviana Castro

Provlegantoj: Bob Williamson, Francisko
Lorrain, Silvano Auclair, Trefleo Mercier

Fotoj: Diversaj

Artikoloj: Pluraj aŭtoroj

Lumo

Publikigite kvaronjare

Farite en:

Julio 2026

Enhavo

4 Intervjuoj:

Kiu Estas...? Guy Matte

10 Movado:

Debato pri la Estonteco de Esperanto en Kanado

11 Ĉe la Praula Fajro:

Sedna, la diino de la maroj

12 Lokaj kluboj:

La montreala klubo je vojkruciĝo

16 Eventoj:

Amikeco kaj Aventuroj: Mekaro 2026

18 Eventoj:

VARIE prezentis la riĉecon de Peruo

20 Ververaj Valoroj:

Ĉu Financa Libereco?

21 Mesaĝo de UEA:

Okaze de la Internacia Tago de Espero

22 Recenzo:

La morto de Ivan Iljiĉ

23 Nova novelaro kaj nova retbutiko

24 Puzlo:

Enigmo de la vojaĝontaj E-istinoj

25 Amuzaĵoj

26 Kanada scienco:

Kosmo Sen “Malluma Energio”

La Aŭda Galaksio

“Blanka Hidrogeno” sub la Kanada Ŝildo

28 El la Arĥivoj:

Lingva Politiko kaj Impostoj

30 Nordamerike:

Esperanto atingas novajn aŭskultantojn nordamerike

La 8a Usona Bona Film-Festivalo Komenciĝas

31 Kiel testamenti al KEA aŭ ESK

32 Nekrologoj:

Ĵosefo Carrillo

Probal Dasgupta

34 Anoncoj:

Venontaj eventoj 2026

Letero de la Redaktoroj

Garry Evans kaj Luis Obando

Jen nova numero de Lumo, kaj kredeble vi tuj rimarkis ke ĝi havas novan grandecon, kial? Ĉar ni eksperimentas pri via prefero. Kiel vi jam atentis ni ekaventuris ne nur redakti nian kanadan revuon, sed ĝin ankaŭ presi kaj dissendi al ĉiuj niaj membroj. Nin karese ĝojigis viaj gratulaj reagoj (mesaĝoj kaj eĉ manverkitaj leteroj), tial ni forte konvinkiĝis ke ni troviĝas sur la ĝusta vojo. Nu, la malfacila parto estas la kosto, ĉu ne? Origine nia plano estis simple krei novan kategorion 'abonantan' kiu rezultigus paperan revuon nur al ties abonantoj, dum aliaj daŭre ricevu nur la bitan version. Tamen ni konfesas ke nia estraro ne volas malhavigi la paperan revuon al nepagipovaj kanadaj E-avidlegantoj.

Danke al tre favora interkonsento kun *Canada-Post* nia dissendado kostos tre malmulte kaj preskaŭ la tuta kosto temos nur pri presado. Do ni longe cerbumas pri la plej taŭga solvo, ĉu komuna finankkampanjo? ĉu nova abonanta kategorio? ĉu io alia?. Ni do fervore petas vian helpon kuncerbumi kun ni pri la irinda vojo, vi povas mesaĝi nin per lumo@esperanto.ca aŭ rekte alparoli iun el niaj estraranoj. Ni elkore dankas vin pro via atento kaj nun bonvolu ĝui la novan numeron de Lumo.

Ĉu vi ŝatas
LUMON?



Ĉu vi volas verki artikolon por *LUMO*?

Jes, faru!

Tial ke ni publikigas 4 numerojn jare ni konstante akceptas novajn artikolojn. La artikolo bonvole estu konciza kaj tre interesa por kanadaj esperantistoj. Vi povas sendi al unu el niaj redaktoroj aŭ rekte per lumo@esperanto.ca

Ĉiuj aprobitaj artikoloj publikiĝos en nia retejo, kaj la plej bonaj aperos ankaŭ en la presita *Lumo*.

Kiu Estas...?

Guy Matte:

Sindikatismo, franglingvismo kaj esperanta idealo

Intervjuita de Garry Evans



Kie vi naskiĝis kaj kreskis?

Mi naskiĝis en malgranda vilaĝo, kies nomo estas Saint-Ubalde. En mia tempo ne estis “e” ĉe la fino, sed nun oni aldonis ĝin: Saint-Ubalde. Tio estas malgranda vilaĝo inter Kebeko kaj Shawinigan. Ĝi troviĝas en bela valo, kaj estas tre tipa franckanada vilaĝo.

Mia patro havis malgrandan bienon. Li trovis edzinon en Montrealo, 200 kilometrojn for. Sed mia patrino estis infano de granda urbo; ŝi neniam kuiris en sia vivo, kaj havis grandan nombron da fratinoj, kiuj faris ĉion. Nun ŝi troviĝis en vilaĝo, kie ne estis fluanta akvo, nek neceso en la domo. Tio devis esti granda ŝanĝo kaj ŝoko por ŝi.

Mi naskiĝis post unu jaro. Sed post du jaroj mia patro mortis. Mi havis fraton, kiu estis unujara, kaj alian fraton, kiu estis nur sesmonata. Kaj mia patrino troviĝis en tiu kampara vilaĝo. Ŝi estis tre kuraĝa virino.

Ŝi reedziniĝis post du jaroj kun nova patro, kiu estis tre bona por mi. Ili havis du aliajn infanojn, kaj adoptis trian. Do ni estis sesope. Sed post iom da tempo, ĉar laboro en bieno estas tre malfacila, ni translokiĝis al Montrealo, kiam mi estis naŭjara.

Mi iris al lernejo tie, kaj poste komencis labori. Mi iom ribelis kaj ne volis fini la altlernejon. Eĉ se mi poste iris al universitato, mi ne havas altlernejan diplomon.

Ĉu vi tiam eklaboris?


Jes, mi laboris en diversaj aferoj. Mi laboris en premilejo, kie mi premilis mantelojn kaj jakojn en ege varmega loko. Mi laboris en assekur-kompanio dum kelkaj jaroj, kaj de tie mi translokiĝis al Otavo, kiam mi estis dekok- aŭ deknaujara.

Kvankam vi ne finis altlernejon, vi sukcesis iri al universitato en Otavo?

Oni akceptis min kiel plenkreskulon. Kiam mi alvenis en Otavo, mi laboris en la biblioteko de la parlamentejo dum du jaroj. Tio vekis min al politiko. Kiam oni laboras en la parlamentejo, oni povas vidi ĉion, kio okazas en la federacia registaro. Tie okazis miaj unuaj politikaj lernadoj. Poste mi iris al universitato, fariĝis instruisto, kaj instruis dum ok jaroj en elementa lernejo. Poste mi komencis labori por la sindikato, kaj faris mian abiturienton en la universitato.

Mi komencis instrui en septembro 1971. Kaj jam en 1972 mi komencis iel agadi kun la sindikato. Tiam okazis granda striko de la tuta instruistaro de la provinco Ontario kontraŭ la registaro.

Mi finis mian magistran studon en 1979. Kaj tuj poste mi ricevis oferton de la Universitato Laurentienne, en Sudbury, por instrui tie dum somero. Ŝajne ili ŝatis tion, kion mi faris dum la somero, kaj demandis, ĉu mi restus. Do mi restis du pliajn jarojn



instruante en la universitato, en la porinstruista fakultato. Poste mi iris plentempe en la sindikaton, finfine kiel prezidanto.

Ĉu en Otavo vi malkovris Esperanton?

Kiam mi laboris en la parlamenta biblioteko, mi loĝis en la urbocentro. Mi piediris ĝis la parlamento ĉiutage. Unu tagon, dum la piedirado, mi tute hazarde vidis ekspozicion pri Esperanto.

Tiam KEA havis oficejon sur Sparks-strato. Mi pensis: “Ho, tio estas interesa.” Mi jam antaŭe legis pri Esperanto en iu romano, sed ne povis trovi informojn pri ĝi. Mi eniris kaj parolis kun la sinjoro, kiu estis tie, Chris Smilga, se mi bone memoras.

Mi renkontis ankaŭ Lorcán Ó hUiginn. Li diris: “Komenciĝos kurso post kelkaj semajnoj. Se vi volas aliĝi...” Mi aliĝis, kaj komencis la kurson la 4-an de oktobro 1968.

Vi eĉ memoras la daton?

Grava dato en mia memoro, ĉar en la sama klasĉambro estis mia estonta edzino! La sorto regis tiam.

La instruisto estis la hungara pastoro Boglari?

Jes, la sama, kiu instruis al George du Temple. Mi tiam ne konis George kiel Wally. Ankaŭ li loĝis en Otavo tiutempe. Mi ne memoras ĉu li estis en la sama klasĉambro. Boglari instruis plurajn esperantistojn en la urbo dum du aŭ tri jaroj. Li instruis Esperanton ankaŭ en la altlernejo. Estis 15 lernantoj en mia klasĉambro kiam li instruis. Li estis tre efika instruisto, kiu uzis la Cseh-metodon, la rektan metodon. Neniam li uzis la lokan lingvon, ĉar estis kaj franclingvanoj kaj anglalingvanoj en la klasĉambro. Kaj li instruis tre, tre sukcese. Pro tio ni havas tre bonan memoron pri Pastro Boglari. Li estis tre afabla homo. Li ne estis juna, sed li tre bele parolis Esperanton, kiel ĉiuj hungaroj. Post du jaroj li tamen reiris al Eŭropo. Ni perdis grandan instruiston tiam.

Kiom el tiu klaso de ĉirkaŭ 15 homoj finfine iĝis esperantistoj?

Estis pluraj. Minimume sep estis tute konvinkitaj kaj restis. Lorcán sukcese trovis monon por ke tiuj, kiuj

sukcesis, povu iri al Eŭropo, al Universala Kongreso. Kvar el ni povis iri al UK danke al tiu subvencio.

Ni havis ankaŭ tre aktivan lokan grupon, ĉar estis pluraj junaj homoj, kiuj lernis Esperanton en tiu tempo.

Kiaj estas viaj memoroj de via unua Universala Kongreso?

Ĝi estis en Helsinko en 1969. Merle iris ankaŭ. Ni estis kune tiam, sed ankoraŭ ne geedziĝintaj. Tio estis mia unua vojaĝo en Eŭropon. Merle iris ankaŭ al Svedio por la Internacia Junulara Kongreso. Mi iris al Leningrado, kie mi renkontis rusajn esperantistojn, ekzemple junan paron kun kiuj mi poste multe interŝanĝis.

Mi bone memoras tiun kongreson en Helsinko en 1969. Tie ni renkontis homojn kiel Renato Corsetti, Humphrey Tonkin, Michela Lipari, Detlef Blanke...

Ni ĉiuj estis junaj. Estis la florpova epoko, fine de la sesdekaj jaroj. Estis amaso da junuloj en la UK. Ni tiel bone kuniĝis en tiuj jaroj, ke ĝis nun ni ankoraŭ estas amikoj, eĉ se ni malaperas unu post la alia.

Ĉu Esperantujo en tiu tempo havis la saman idealisman etoson kiel en la tuta Eŭropo, ekzemple dum la studenta revolucio en Francio en 1968?

Jes, estis ideaj bataloj inter komunistoj kaj kapitalistoj. En tiu tempo estis la ruĝa bloko kaj la kapitalisma bloko. Ni ĉiuj venis de diversaj landoj kaj defendis niajn proprajn ideojn pri kiel la afero devus esti farata politike.

Detlef Blanke estis de la orientgermana flanko.

Sed eĉ li diris: “Mi devas diri al vi tute sekrete: estas kelkaj problemoj, ĉu ne? Sed ĉi tie estas tamen la plej bona sistemo.”

Ja estis tiuj grandaj bataloj inter ni, uzante Esperanton, kompreneble. Ni povis interŝanĝi ideojn.

Do Esperanto donis la eblecon renkonti homojn el la alia flanko de la fera kurteno...

Ili havis permeson eliri la landon por iri al diversaj kongresoj. Pro tio estis miloj da esperantistoj malantaŭ la fera kurteno, ĉar tio estis maniero por ili eliri el sia lando. Tio ebligis multan interŝanĝon inter homoj.

Vi renkontis vian nunan edzinon, Merle, pere de Esperanto. Kiam vi geedziĝis?

En 1973. Ni renkontiĝis en oktobro 1968 kaj geedziĝis en 1973.

Ŝi estas anglalingvano. Ĉu vi parolis, kaj ĉu vi daŭre parolas, Esperanton kune?

Dependas. Kiam ni estis kune en la komenco, ni ofte parolis Esperanton, ĉar ĝi estis la lingvo, kiun ni uzis kiam ni renkontis unu la alian. Ŝi ne parolis la francan, kaj mi ne tre bone parolis la anglan. Do ni ofte uzis Esperanton tiam. Sed, pro mia laboro ktp.,



Guy kaj Merle

mi lernis la anglan. Kaj kiam ni geedziĝis, ni havis kontrakton, pro la fakto, ke mia edzino estas juda kaj mi estis francelingvano. La kontrakto inter ni estis, ke niaj infanoj estu francelingvanoj, sed ili povu esti judoj. Por fari tion, ŝi devis lerni la francan.

Ŝi bezonis kelkajn jarojn por tio. Pro tio ni ne havis infanojn ĝis 1979. Dum tiuj ses jaroj ŝi lernis la francan. Kaj nuntempe ŝi bone parolas la francan. Kiam la infanoj venis, ni ĉiam parolis la francan en la domo. Ĉiam. Sed poste ni pli kaj pli parolis la anglan. Kaj Esperanton. Sed ĉiam kiam ni estas kun la familianoj, ni parolas la francan. Miaj infanoj ĉiam parolas france kun la patrino kaj kun mi. Krom se mia filino estas kun sia patrino kaj mi ne estas tie; mi povas aŭdi kelkfoje, ke ili parolas la anglan! Sed kiam mi envenas en la ĉambron, ili tuj ekparolas la francan.

Kiom da infanoj vi havas?

Mi havas filinon, kiu havas du filojn, kaj mi havas filon, kiu havas tri filinojn. Do multajn genepojn.

Ĉu ili interesiĝas pri Esperanto?

Mia filo certe. Dum unu el niaj vojaĝoj, li komencis lerni Esperanton. Kiam ni revenis, li povis interŝanĝi kun ni en Esperanto, ĉu skribe, ĉu parole. Kaj ankoraŭ nun. Li lernis nur per si mem, ĉar li bone regas lingvojn. Li ofte sendas notojn skribitaĵojn en Esperanto. Ne tiom mia filino, sed ŝi ne kontraŭas Esperanton.

Vi estas fervora pri la rajtoj de francelingvanoj en Kanado. Kial?

Mi instruis en francelingvaj lernejoj en Ontario. Kiam oni instruas historion, ekzemple, oni vidas kiel malfacile la francelingvanoj en tiu lando povis konservi sian lingvon, precipe en la provincoj ekster Kebekio. Certe en Ontario, kie oni malpermesis la instruadon de la lingvo dum jaroj. La gepatroj devis forte batali por kontraŭstari la decidon de la registaro. Ne nur en nia provinco, sed ankaŭ en aliaj

provincoj, ĉar ĉiuj provincoj faris la saman malpermeson dum tiu tempo.

Pro tio oni volas, ke la lingvo daŭru. Ĝi ne povas esti sekreta lingvo; ĝi devas esti publika lingvo. Por ke ĝi estu publika lingvo, ĝi devas esti instruata, kaj ĝi devas esti uzata en la diversaj kampoj de la vivo: ĉu en sano, ĉu en la kortumoj, ĉu en la sociaj rilatoj. Pro tio ni devas havi lernejojn kaj malsanulejojn. Vi devas havi la eblon, kiam vi estas en kortumo, paroli

La angla ankoraŭ ne estas tia universala ligilo, kia ĝi pensas, ke ĝi estas nuntempe

la francan; kiam la registaro traktas kun vi en la diversaj fazoj de la vivo, ĝi traktu kun vi en via lingvo.

Pro tio, kiam la federacia registaro de Pierre Trudeau decidis, ke Kanado estu oficiale dulingva en 1969, iom post iom ankaŭ en la diversaj provincoj la aferoj ŝanĝiĝis. Por ke tio okazu, oni devis forte batali. Mi estis parto de tiuj bataloj, ĉu kiel prezidanto de la francelingvanoj ekster Kebekio, aŭ kiel ĉefo de la sindikato de francelingvaj instruistoj, aŭ en diversaj medioj kie mi laboris.

Ĉu francelingvanoj en Ontario nun povas libere uzi la francan lingvon ie ajn?

Mi preskaŭ dum la tuta vivo uzis nur la francan, pro la fakto ke mi estis instruisto en franca lernejo, laboris en franca sindikato, kaj laboris ankaŭ por ke la diversaj servoj de la registaroj, provincaj kaj aliaj, estu farataj ankaŭ en la franca.

Nuntempe, pro la grandaj ŝanĝoj en la lastaj 30 jaroj en nia provinco, la franca lingvo estas multe pli agnoskata de la registaro.

Revenante al Esperanto, vi multe agadis en la Kanada Esperanto-Asocio en la 1970-aj jaroj. Kia estis la asocio tiam?



Vigla, pro la fakto ke Loreán Ó hUiginn estis la vera motoro. Li dediĉis sian tutan vivon al Esperanto. Li laboris en la parlamento por Hansardo. Ĉiun liberan tempon li laboris por Esperanto. Pro tio estis multe da agado. Li parolis en ĵurnaloj, en radio, en televido, kaj organizis grandajn kanadajn kongresojn.

Pro la fakto, ke li estis tia motoro, estis pli facile por ni helpi lin. Kaj estis malfacile diri “ne” al li, ĉar li estis tre afabla. Ni laboris multe. Post lia forpaso, la aferoj estis malpli viglaj, ĉar neniu vere anstataŭis lin. Estis tre efika tempo.

Vi multe agadis ankaŭ por UEA. Vi estas delonge komitatano A por Kanado, kaj revizianto. Kiam vi ekagis por UEA?

Mi estis komitatano eĉ en la 1970-aj jaroj, ĉar ni iris al la Universalaj Kongresoj ĉiujare de 1969 ĝis la fino de la 1970-aj jaroj, krom unu jaro, kiam ni havis junajn infanojn. Kiel juna instruisto, mi havis du monatojn da ferioj dum la somero, do Merle kaj mi ĉiam iris al la kongreso. Ĉar ni estis en la kongreso, kaj ĉar mi ŝatis organizi aferojn kaj partopreni en estraroj pro mia profesia vivo, mi fariĝis komitatano.

Tiuj estis interesaj tagoj. Tio estis, ekzemple, la tempo de la Hamburga Puĉo, kiam Ivo Lapenna foriris el UEA. Ni laboris tre proksime kun Hum-

phrey Tonkin, Renato Corsetti kaj aliaj por ŝanĝi la estraron. Ni vidis, ke la afero estis tro premita de Ivo Lapenna. Li estis unu el la plej elstaraj parolantoj de la lingvo. Sed la premo, kiun li metis sur UEA, faris, ke la junuloj, kiuj volis partopreni, ne povis. Kaj la junuloj decidis en la 1970-aj jaroj: oni forigu la maljunulojn kaj donu la potencon al la junuloj.

Post pli ol 50 jaroj da agado en UEA, kiel vi taksas ties sukcesojn kaj malsukcesojn?

Estis unu granda ŝanĝo, kiu ne helpis al UEA: la falo de la fera kurteno. Ne plu estis kialoj por homoj en tiaj lokoj lerni Esperanton por eliri el la lando. Nun ili povas moviĝi facile en Eŭropo kaj tra la tuta mondo. Tio ne helpis al UEA, kiu havis dekojn da miloj da membroj, kaj nun havas nur ĉirkaŭ 4 000.

La dua defio estas, ankaŭ pro la falo de la fera kurteno, ke la angla lingvo ŝajnis fariĝi pli utila ol Esperanto al multaj homoj en internaciaj oficialaj medioj, aŭ kiam oni volas paroli kun homoj el diversaj landoj. Fariĝis same en la instrusistemo: ekzemple en Ĉinio la unua lernata fremda lingvo estas la angla. Tio signifas, ke Esperanto ne plu estas rigardata kiel la solvo por la lingva problemo.

Sed kiam oni vizitas diversajn landojn, oni povas

vidi, ke tio ne estas vera. Estas homoj, kiuj lernas la anglan kaj povas uzi kelkajn vortojn, sed ne povas havi veran konversacion. La angla ankoraŭ ne estas tia universala ligilo, kia ĝi pensas, ke ĝi estas nuntempe. Sed tio ne helpis al Esperanto.

Por mi Esperanto estas socia fenomeno, kaj gravas konservi tiun sistemon vivanta.

Alia problemo estas, ke la mondo estas tiel vasta, ke UEA ne plu estas la sola solvo. Homoj plej ŝatas labori por Esperanto en sia propra medio, sia propra lando aŭ kontinento. Multaj homoj, ekzemple, laboras por Esperanto tra la Eŭropa Unio anstataŭ tra UEA. Kiam oni iras en Sudamerikon, ne estas tiom da intereso pri UEA. Ili diras: “Kion ĝi donas al mi? Mi preferas paroli kun miaj amikoj.” Por UEA, la granda afero estas la Universalaj Kongresoj. Sed nun pro Zoom — kaj la pandemio ne helpis — la UK-oj ne plu estas tiel allogaj. Hieraŭ vespere, ekzemple, mi estis en Zoom-kunveno kun ĉilianoj, sed unu partoprenanto venis el Rusio, kaj mi ankaŭ estis eksterlandano. Kial tiuj homoj iru al UEA, se ili volas paroli Esperanton kun eksterlandano?

Ĉu vi taksas, ke UEA faris erarojn aŭ mispaŝojn dum la lastaj 50 jaroj?

Mi ne pensas, ke UEA faris erarojn. Ĉu ĝi povintus fari pli? Eble. Sed mi ne certas, kion ĝi povus fari pli. La ŝanĝoj de la mondo tiel malhelpis. Sed ni devas pripensi, laŭ kiu alia maniero UEA povas esti la tegmento por diversaj okazaĵoj. Ĝi devas konservi la fadenojn inter landoj kaj asocioj. Sed kunigi ĉiujn esperantistojn en la mondo? Ne plu eblas. Tio multe kostas, precipe por la okcidentanoj, kiuj devas multe elspezi por esti membroj. Kaj por tiuj en malpli pagipovaj landoj, ili preskaŭ ne pagas. Sed kiam oni ne

pagas, la emo labori por organizaĵo ne estas la sama. Certe estas bezono havi UEA-n, ĉar ĝi estas ilo por kunigi la diversajn landajn asociojn.

Kion vi pensas pri Esperanto nun? Ĉu ĝi daŭre havas rolon?

Mi pensas, ke ĝi ankoraŭ estas grava ilo, kiu eble ne estas sufiĉe uzata. Ĝi valoras, ĉar oni konservas tian lingvon en la mondo kiel eblan solvon en la estonteco. En 1887, kiam Esperanto komenciĝis, estis nur du aŭ tri homoj, kiuj parolis la lingvon, sed poste milionoj spertis ĝin diversgrade ĝis nun. Tio signifas, ke ĝi havas ian gravecon por certaj homoj. Por la homaro ĝenerale ĝi ankaŭ havas valoron, kiun ni konservu. Por mi Esperanto estas socia fenomeno, kaj gravas konservi tiun sistemon vivanta.

Ĉu vi estas optimisma pri la estonteco de Esperanto?

Estas facile por mi esti optimisma, ĉar mi mortos post kelkaj jaroj! [ridas] Mi ne vidos la finan venkon. Sed mi supozas, ke se oni sukcesis dum preskaŭ 140 jaroj konservi tian kreaĵon de unu junulo el Rusa Imperio, ĝi daŭros. Venos aliaj homoj, kiuj prenos mian postenon kaj la postenojn de aliaj. Oni ne scias ĉu ili venos el Kanado; eble ili venos el Benino, aŭ el alia loko, kiu volas havi pli da rilatoj kun la mondo.

Persone, Esperanto estis por mi ege interesa vivlernado, ĉar ĝi ebligis al mi koni la mondon, kiun mi alimaniere ne estus koninta. Kiel oni povas iri al Grekio, eliri el aŭtobuso, kaj tuj trovi homon, kiu parolas nian lingvon kaj diras: “Venu ĉe min”? Mi faris tion ankaŭ en multaj aliaj lokoj. Mi estis en Armenio antaŭ du monatoj kun esperantistoj, kiuj estis ege interesaj. Ni povis facile interparoli. Do, por mi, Esperanto estis tre interesa persona vivosperto. Pro tio ĝi valoris kaj ankoraŭ valoras. Kaj mi pensas, ke por homoj kiel mi, kiuj ankaŭ volas havi tiajn spertojn, Esperanto daŭre ege valoros.

Politike, ĝi eble ne estas la nuna solvo. Sed devas esti ia solvo, kiu eble iam estos prenita de instancoj.

Debato pri la Estonteco de Esperanto en Kanado

Sekve al la komentoj de Yves Bellefeuille, James Bridge, kaj Bob Williamson pri Esperanto en Kanado en la plejlasta numero de Lumo, la debato daŭras. Ni ricevis pliajn kontribuojn de Anne Neave kaj Bruce Arthur.

Se vi volas aldoni ankaŭ viajn pensojn al la debato, bonvolu sendi retmesaĝon al informo@esperanto.ca.

Kontribuo de Anne Neave (Kamloops, BK)



Ankaŭ interesis min la pensoj de Yves, James kaj Bob pri la estonteco de Esperanto en Kanado. Mi konsentas kun James, ke “fine de la tago, laborantoj estas tro lacaj kaj havas nek la energion nek la tempon por studi fremdan

lingvon, kiu neniel materiale kontribuas al la ĉiutaga vivo”. Mi aldonus, ke por anglalingvanoj ne estas granda urĝo lerni Esperanton aŭ alian lingvon. Se oni vojaĝas, sufiĉe da alilandanoj parolas la anglan, almenaŭ sufiĉe por komuniki. Tion mi lernis, ĉar mia edzo kaj mi posedas ekskursan kompanion kaj gvidis grupojn al multaj landoj dum la pasintaj 40 jaroj.

Mi opinias, ke estas rolo por Esperanto por tiuj, kiuj ŝatas lerni lingvon, korespondi kun homoj ĉirkaŭ la mondo, kaj ĉeesti kunvenojn kaj kongresojn. Sed - kiel internacia lingvo, kiu ludos grandan rolon en la mondo? Ŝajnas, ke tiu sonĝo paliĝas.

Kio okazas al la membroj de KEA? Kiel Yves diris, eble multaj membroj aĝiĝas (kiel mi - 78 j.) kaj simple laciĝas. Aŭ, kiel mi, post kiam mi lernis Esperanton, mi dediĉis mian tempon, entuziasmon kaj pasion al la mondo de Esperanto dum 10 jaroj.

Tiam - vivo evoluis. Mi ŝanĝiĝis - edziniĝis, havis familion, nun havas junajn nepinojn. Mi trovis novajn pasiojn, novajn komunumojn, kaj daŭre laboras en multaj grupoj. Komence Esperanto estis tre grava en mia vivo. Nuntempe, por mi, aliaj temoj estas pli gravaj - klimata ŝanĝo, kiel movi for de fosilia brulaĵo, kiel savi nian planedon por niaj familianoj...

Kontribuo de Bruce Arthur (Regina, SK)



Mi interesiĝis legi la opinion de la esperantisto en Sault Ste. Marie [James Bridge]. Mi komprenas, ke li sentas senesperon post jaroj da

malsukceso. Tamen mi ankoraŭ kredas, ke eblas interesi homojn pri Esperanto, se ni povas trovi la ĝustan manieron. Estas vere, ke la lingvo apenaŭ havas sufiĉe da parolantoj por esti profita al lernintoj. Sed ĝi estas bona hobbio, kaj milionoj da homoj interesiĝas pri hobbioj por trovi novajn amikojn, por ekzerci la cerbon, ktp. Kaj se ni povas allogi sufiĉe da uzantoj, la lingvo estos pli utila, kaj homoj komunikos pli facile kaj pli juste. Estas inspira ideo. Eble iuj lokaj kluboj povos raporti, kiel ili sukcesis allogi novajn membrojn lastatempe, kaj aliaj kluboj povos imiti ilin.

Ĉe la Praula Fajro

Sedna, la diino de la maroj

De Luis Obando

Brita Kolumbio

Ĉi tiu legendo apartenas al Inuitoj, kiuj loĝis ĉefe en Nunavuto kaj Jukono (krom Gronlando kaj Alasko)

Sur la glacia tegmento de la mondo, iam loĝis Sedna, inuita junulino petolpetola plenplena je nekomparebla beleco, kies fiero igis ŝin rifuzi ĉiujn proponitajn virojn.

Unu tagon, en ŝian vilaĝon alvenis alloga ĉasisto vualita de dikaj feloj. Kun melodia voĉo kaj promesoj pri senlima nutraĵo en paradizo, li delogis la junulinon kaj forportis ŝin trans la oceanon. Sed je la alveno malkaŝiĝis la trompo: la ĉasisto fakte estis birda ŝamano, mistika fulmaro, kiu kondamnis ŝin al vivo frida, soleca kaj mizera sur dezerta klifo.

Aŭdinte la akutajn lamentojn de sia filino transirantaj la glacimaron, la patro de Sedna per sia kajako eknavigis por ŝin savi. Je serena nokto, ŝin li prenis en sian boaton kaj ili fuĝis. Tamen, la birda ŝamano la perfidon eltrovis. Perforte li siajn obskurajn flugilojn svingegis, tio senbridigis tempeston

de drakona furiozo. Roris la maro, levante akvomurojn nigrajn, kiuj minacis englute frakasi la fragilan kajakon.

Ekposedis teruro la oldulon. Kredante ke la akra oceano postulis la junulinon kiel oferaĵon, tute despere kaj kovarde, por sian propran vivon savi, li egoisme decidis sian filinon ĵeti en la akvojn. Sedna, suferanta, malmergiĝis kaj alkroĉiĝis per ĉiuj siaj fortoj al la kajaka rando. Sed ŝia patro, blindigita de paniko, per sia ostohakilo detranĉis ŝiajn fingrojn por ŝin dekreĉi.

Kaj tiam meze de tragedia pelmelo, okazis marmiraklo. Dum ŝiaj fingroj falis en la glacian abismon, ili ne sinkis en morton, sed magie ekvivis. La plej etaj artikoj transformiĝis en la rapidajn fokojn, el la sekvaj naskiĝis la distingindaj rosmaroj kun eburaj kojndentoj, kaj el la plej grandaj fragmentoj aperis la enormaj kaj majestaj balenoj.

Sedna subakviĝis en senkoloran oceanan nokton, sed ŝi ne pereis. Ŝi transformiĝis en la eternan Diinon de la Maroj, la supernaturan diaĵon de ĉiuj glaciaj akvoj. Hodiaŭ ŝi regas la estaĵojn, kiuj el ŝia doloro naskiĝis. Kaj kiam homoj la ekvilibron respektas, ŝi la oceanon tenas en kalmo. Sed kiam okazas forgeso aŭ respektomanko, la maro ĥaosiga kaj malaperigas bestojn en la profundojn.

Nur bonkoraj ŝamanoj, en songoj aŭ trancoj, rajtas subakviĝi por dorlote kombi ŝian longan interplektitan hararon, kvietigante ŝian koleron kaj rehavante konkordon inter la mondoj.





Montreala klubo en Zamenhofa tago

La montreala klubo je vojkruĉiĝo

De Nicolas Viau

La Montreala klubo estas unu el la plej malnovaj de Kanado. La Esperanto-movado grandparte alvenis en Kanado danke al pioniroj el Montrealo kaj ties regiono (ekzemple Albert Saint-Martin, kies nomo estis donita al parko en Montrealo). Tamen ne estas multaj informoj pri la klubo antaŭ la 1960-aj jaroj, laŭ libro “30 jaroj da agado”, de la Esperanto-Societo Kebekia (publikigita en 2012). Ni tamen rajtas konstati, ke dum la sekvaj jardekoj ĉiam restis kerno de aktivuloj, do oni rajtus pensi, ke Esperanto ĉiam (aŭ eble preskaŭ ĉiam) estis parolata en Montrealo ekde ĝia alveno!

La Montreala aktivularo, kune kun aktivuloj de tuta Kebekio, Kanado kaj de la mondo, ja povas fieri pri tio, ke ĝi efektive atingis kelkajn gravajn sukcesojn dum la lastaj jardekoj, interalie sub la gvido de Normando Fleury kaj Zdravka Metz (do ekde la fruaj 1980-aj jaroj).

Tamen post sukcesoj kiel la 48-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en 1992, la 7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en 2008 (eventoj, kiujn mi mem ne partoprenis), kelkaj eldonoj de la Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MEKARO) kaj kompreneble la Universala Kongreso (UK) - kiun mi havis la plezuron helpi organizi - kiun ni, Montrealanoj, unuafoje sensukcese kandidatis gastigi por 2017 kaj poste, laŭ decido de Universala Esperanto-Asocio (UEA), sukcesis gastigi en 2022 (origine planite por 2020). Kiel vi certe bone scias, ĝi devis esti prokrastita pro la pandemio, kaj finfine okazis en 2022.

Vojkruĉiĝo

Post tiuj ĉi sukcesoj kaj aliaj projektoj, oni tamen rimarku, ke nia Montreala grupo de aktivuloj staras je vojkruĉiĝo. Ŝajnas, ke nia agado kaj aktivuloj

fariĝis iom pli trankvilaj.

Dum jaroj, la klubo kunvenis en la Botanika Ĝardeno de Montrealo. Ekde la 1980-aj jaroj, kaj ĝis 2015, Normando Fleury kaj Zdravka Metz (kernaj aktivuloj de ESK kaj de la Montreala grupo), posedis domon en la kvartalo Rosemont-La Petite Patrie en Montrealo, kiu ankaŭ servis kiel klubejo, sub la nomo “Montreala Esperanto-domo”. Tie dum jaroj okazis siatempe kursoj, estis biblioteko, kaj kompreneble kunvenoj (kun antaŭplanitaj temoj), aŭ kunaj manĝoj, ktp.

Mi mem unuafoje ekparolis en Esperanto en tiu domo, kiam mi aperis okaze de kunveno fine de majo 2009. En tiu epoko, oni ankaŭ, unu fojon ĉi-umonate, okazigis kunvenon en la restoracio Végo, agrabla kaj konvena vegetara restoracio en la urbo-centro de Montrealo.

Post kiam Normando kaj Zdravka translokiĝis ekster Montrealon, oni decidis okazigi ĉiujn regulajn kunvenojn en Végo. Tie okazis amikecaj renkontiĝoj (sen aparta programo) dum jaroj. Ja nek mi

nek aliaj aktivuloj verdire ofte ne havas la tempon vere plani kunvenojn, do niaj kunvenoj estis simpla babilrondo. Mi kaj pluraj aktivuloj tamen ĝoje partoprenadis en preskaŭ ĉiuj kunvenoj.

Ili tamen estis agrablaj kaj sukcesaj: regulaj renkontiĝoj de karaj samideanaj geamikoj. Mi mem tre

Oni ja ofte parolas pri laciĝo de lokaj aktivuloj post okazigo de gravaj kongresoj...

ĝuis tiujn jarojn. Ni havis dum tiu epoko la plezuron plani kaj efektiviigi plurajn projektojn: la UK en Montrealo, partoprenoj de esperantistoj kadre de la lingva festivalo “LangFest”, kiu okazis en Montrealo de 2016 ĝis 2019, kaj ankaŭ KER-ekzamenoj (sub la gvido, en Eŭropo, de Katalin Kováts), unuafoje en nia urbo, en 2018.

Tamen de 2022, jaro de la UK, ŝajnas pli mal-





facile ol antaŭe venigi homojn al kunvenoj. Dum la 2010-aj jaroj, ofte venis 10-15 homoj ĉiun fojon. Nun la kutima ĉeestantaro nombras eble 5 kaj 10. Oni ja ofte parolas pri laciĝo de lokaj aktivuloj post okazigo de gravaj kongresoj...

Tamen nun, la sorto alportas al ni okazon renovigi nian manieron kunveni: la restoracio Végo anoncis antaŭ kelkaj semajnoj, ke post 49 jaroj da funkciado, ĝi fermiĝos tiun ĉi julion.

Ni do devos trovi novan kunvenejon. Ŝanĝiĝoj,

ĉu elektitaj aŭ ĉu truditaj, ĉiuokaze ĉiam estas bonaj okazoj reaserti, ĉu oni estas sur la ĝusta vojo, kaj elspensi novajn manierojn funkcii.

Kun apogo de la estraro de ESK, ni, Montrealaj aktivuloj, do baldaŭ anoncos nova(j)n kunvenejo(j)n, eble kun nova programo kaj nova celo. Mi ĉiuokaze celas esti parto de la paŝado antaŭen!

Ideoj de niaj partoprenantoj aŭ eblaj partoprenantoj – kaj ankaŭ de klubanoj de aliaj partoj de Kanado bonvenas, kompreneble!



Nicolas Viau



Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo 2022

Kaj tamen... ideoj

Ĉar, eble iom paradokse, projektoj kaj ideoj ne mankas. Montrealo estis historie loko de pluraj kreaĵoj (interalie Lumo!) kaj elpensaĵoj rilate al Esperanto laŭ la historio. Ideoj pri tio ne ĉesis dum la lastaj jaroj.

Pluraj libroj estis publikigitaj. En Montrealo estis ankaŭ verkita la teatraĵo « 1910 » de Ĵenja Amis (kaj prezentita dum la Universala Kongreso en 2022), en kiu la historio de la familio Zamenhof en Montrealo estas grava temo, danke al gravaj lokaj historiaj esploroj. Paralele, estiĝis alia historia projekto pri la fama svisdevena kanada psikiatro Henri Ellenberger (pri kiu oni povis legi en la lasta numero de Lumo), kiu ankaŭ estis esperantisto kaj dum jardekoj verkis multegajn taglibrojn pri sia vivo kaj pensoj, ĉefe en Esperanto.

Esperantaj temoj do ne mankas en Montrealo. Esperanto ja havas riĉan pasintecon en nia urbo. Nia loka Montreala Esperantujo ŝajne en diversaj periodoj eniris pli “trankvilajn” periodojn, sed post ĉiam estis revivigita de nova generacio de geaktivuloj. Ni eble trapasas tian transiran fazon nuntempe, kaj ni nun decidu, ĉu ĝi havu ankoraŭ estontecon. Laŭ mi, en Montrealo (kaj aliloke), urbo kun grava

konscio pri la rilato inter lingvo kaj socio, kaj loko kun eble surpriza kultura kaj lingva historio malgraŭ pluraj defioj, la respondo estu « jes »!

Paralela Universo en Montrealo – Sabato 15-a de aŭgusto 2026

Jen bona okazo por paroli pri evento, kiu nun fariĝis tradicia en multaj urboj de Nordameriko sed ankaŭ de la mondo: Paralela Universo. Ekde la lanĉo de tiu eventaro, fare de la Toronta samideano Jed Meltzer, ĉiun jaron okazas en Montrealo renkontiĝo kadre de tiu kunvenaro (eĉ se nur virtuale dum la pandemio). Ni provas proponi novan programon ĉiun fojon. Ĉi-jare ne estas escepto kaj ni invitas vin atenti la retejon kaj aliajn komunikilojn de ESK, ĉar kompreneble Paralela Universo ree okazos en 2026 en nia urbo. La evento okazos la 15-an de aŭgusto (la Nacia Tago de Akadio), kaj ĝia temo inkluzivos prelegon pri la historio de francilingvanoj en Nordameriko. Mi elkore invitas vin partopreni, se vi ne estos tro for de ni!

Eventoj



Amikeco kaj Aventuroj: **MEKARO 2026**

De Suzano Bolduc, Kebekio

La 31 partoprenintoj de MEKARO 2026 ĝuis belegan semajnfino en Granbeo! Sabaton la 16an de majo, akceptis nin Zdravka kaj Normando. Dum alvenadis homoj, ni agrable babilis. Post-tagmeze, Normando

gvidis nin laŭ interesa historia urba promeno. Reveninte ĉe niaj gastamaj organizantoj, ni havis agrablan komunan manĝon kaj etosplenan vesperon. Zdravka prezentis inaŭgure sian ampleksan Amerikan Indiĝenan Glosaron. Gratulon al ŝi!

D i -
manĉon,
ni kune
maten-
manĝis

en restoracio Egg Soleil, kaj poste pasigis la tagon esplorante la bestoĝardenon. Bufeda vespermanĝo kaj kultura vespero estis pliaj okazoj amuziĝi kaj interŝanĝi en amika etoso. Aparte plaĉis al mi poema deklamado de Parkero kun lia filino, kaj tradicia dancado gvidata de Évelyne.

London, pro la pluva vetero, anstataŭ la planita promeno en la naturo ĉirkaŭ la lago Boivin, Normando kaj Zdravka denove invitis nin en sia domo por plua babilado. Ĉiam agrable babili inter amikoj, konstati kiel infanoj





kreskis kaj fariĝas admirindaj junuloj, rememori pri konatoj, kiuj ĉifoje ne partoprenis, kaj pri pasintaj okazaĵoj. Tagmeze, la pli malgranda grupo, kiu ankoraŭ ĉeestis, denove vizitis la restoracion Egg Soleil por tagmanĝi.

Intertempe la suno revenis kaj, ĉar mi estas ia finvenkisto, mi proponis al mia kunvojaĝanto, ke ni memstare efektivigu la promenon ĉirkaŭ la lago, antaŭ ol survojiĝi reen al Montrealo. Ni sukcesis iom perdiĝi, havis okazojn babili kun helpemaj promenantoj, kaj malkovris plurajn skulpturojn kaj belajn mozaikojn laŭvoje.

Dankegon al Zdravka kaj Normando, kaj al ĉiuj partoprenintoj!

Mi antaŭĝojas partopreni la laŭvican MEKAROn, kiu okazos en Peterborough, Ontario, post unu jaro!





VARIE prezentis la riĉecon de Peruo

De Garry Evans

Kebekio

venigis la ĉeestantojn Guy Matte. Li menciis la lastatempan tertremon en Venezuelo, kiu trafis ankaŭ esperantistojn, kaj esprimis solidarecon kun la suferintoj. Poste Carlos Miranda, prezidanto de la Perua Esperanto-Asocio, transprenis la gvidadon de la programo.

La aranĝo estis sukcesa miksaĵo de prelegoj kaj muzikaj interludoj, kiuj permesis al la partoprenantoj ne nur lerni pri Peruo, sed ankaŭ sperti ĝian kulturan etoson. Inter la muzikaj prezentoj estis Esperanto-versio de la patriota kanto Y se llama Perú, prezentita de la grupo SPERANTO, kaj kortuŝa prezento de La Espero fare de koruso sub la gvido de Mario Sergio Rosales. Aparte impresis ankaŭ La Kondoro, la mondfama anda melodio konata al multaj pere de Simon & Garfunkel, ĉi-foje kun Esperantaj subtitoloj.

La sepa eldono de VARIE - la Virtuala Amerika Renkontiĝo Inter Esperantistoj - okazis la 27-an de junio 2026. En iom pli ol unu jaro, ĉi tiu regula reta renkontiĝo fariĝis la ĉefa kunveno por esperantistoj tra la amerikaj kontinentoj, kunigante partoprenantojn el norda, centra kaj suda Ameriko, kaj ankaŭ el aliaj mondopartoj. Ĉi-foje la gastiganto estis Peruo, kiu preparis aparte buntan programon dediĉita al sia historio, kulturo kaj Esperanto-movado.

La renkontiĝo, organizita de la Perua Esperanto-Asocio kun la subteno de la Amerika Komisiono de UEA, denove okazis virtuale.

En la plej vigla momento ĉeestis 61 partoprenantoj - tre bona nombro, konsiderante ke samtempe okazis matĉoj de la Monda Pokalo de piedpilko. Inter la ĉeestantoj estis ankaŭ kelkaj partoprenantoj de NASK, kiuj mallonge salutis la kunvenon.

Nome de la Amerika Komisiono de UEA bon-



Carlos Miranda, prezidanto de la Perua Esperanto-Asocio

La unua historia prelego, prezentita de Álvaro Benavides, estis dediĉita al Federico Villarreal, konsiderata la unua perua esperantisto. Villarreal, matematikisto kaj inĝeniero, fariĝis unu el la pioniroj de Esperanto en Sudameriko. Li partoprenis la unuan Universalan Kongreson en Bulonjo-ĉe-Marŝo en 1905, verkis librojn pri Esperanto kaj fondis la revuon Antaŭen Esperanto, tiel signife kontribuante al la frua disvastigo de la lingvo en la regiono.

Julio Enrique Zevallos poste prezentis superriĝardon pri la historio de la perua Esperanto-movado. Li klarigis, ke post la morto de Villarreal la movado dum longa tempo malfortiĝis, sed poste renaskiĝis danke al la laboro de pluraj sindonemaj aktivuloj. Li aparte menciis la kontribuojn de Idelfonso José Núñez Beltrán, Carillo, Janet Skotte kaj Ulpiano Villanueva, kiuj en diversaj periodoj helpis revigligi la movadon.

En sia propra prelego Carlos Miranda prezentis vastan panoramon de Peruo. Li rakontis pri la deveno de la landnomo, la historio de la Inkaa Imperio, la hispana konkero fare de Francisco Pizarro kaj la sendependeco sub José de San Martín. Li ankaŭ prezentis la popolajn kulturojn de la lando, ĝian flagon, naciaĵon himnon, tradiciajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kaj rememorigis pri mondfamaj peruaj kantistoj kiel Yma Sumac, Lucha Reyes, Eva Ayllón kaj Gian Marco Zignago.

La literatura parto de la programo estis reprezentata de Franklin Montenegro-Rodas, kiu rakontis pri sia Esperanto-traduko de la romano Yawar Festo (Sangofesto) de José María Arguedas. Li klarigis, ke la verko, aperinta en 1941, priskribas la kompleksajn rilatojn inter indiĝenoj, mestizoj kaj blankuloj en la anda Peruo de la frua dudeka jarcento, kaj restas unu el la plej gravaj verkoj de la moderna perua literaturo.

La historio de la lando estis kompletigita per prelego de Rafael Mendoza, kiu konigis la antikva-

jn civilizaciojn de Peruo kaj la riĉan kulturon de la anda regiono antaŭ la alveno de la eŭropanoj.

Tre aktualan temon traktis Freddy Iván Sucari Callohuanca en sia prelego La saĝeco de la akvo. Li montris kiel la antaŭkolumbaj loĝantoj sukcesis alfronti inundojn, sekecojn kaj frostojn per inĝeniaj akvomastumaj sistemoj. Inter ili elstaras la tradiciaj waru waru, levitaj kultivejoj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ donas valorajn lecionojn pri daŭripova kunvivado kun la naturo.

La plej nekutima prelego venis de profesoro Dhavit Prem, kiu prezentis la inkaan matematikon kaj ĝian surprizan logikan strukturon. Li argumentis, ke kaj la keĉua lingvo kaj Esperanto montras trajtojn de komputa pensado. Per praktikaj ekzemploj li montris, kiel eblas fari kalkulojn sen la kutimaj arabaj ciferoj, kaj prezentis komputilan sistemon, kiun li mem evoluigis surbaze de inkaa matematika logiko.

La programo estis tiel abunda, ke ne ĉiuj planitaj prelegoj povis eniri en la disponeblan tempon. Kelkaj estis prokrastitaj al la sekva eldono de VARIE, kiun organizos Ĉilio.

Ankaŭ ĉi-foje VARIE montris sian unikan rolon kiel ponton inter la Esperanto-komunumoj de la Amerikoj. Per sia kombino de prelegoj, muziko kaj neformala interŝanĝo ĝi donas al partoprenantoj la eblon ne nur lerni pri la diversaj landoj de la kontinento, sed ankaŭ plifortigi la senton aparteni al vigla kaj diverseca internacia komunumo.



Ĉu Financa Libereco?



De Luis Obando

Brita Kolumbio

D-ro Faŭsto, meze de sia malluma studĉambro, agace tristis. Por sian angoron eskapi, li faris pakton kun Mefistofelo, interŝanĝi sian animon kontraŭ promeso de absoluta kontentigo, tiu fina ekzistada pinto tiom perfekta, ke li finfine petos al la momento: “Haltu, vi estas tiel bela!”.

Tiel same la moderna homo faras sian propran faŭstan pakton. Ni interŝanĝas niajn Junecon kaj forton kontraŭ miraĝo: la magia sumo en nia investkonto. Por tiuj, kiuj senĉesajn labortagojn eltenas suferi, foje oferante po 40, 60 aŭ 70 horojn semajne al labormaŝino, ĉi tiu financa libereco staras kiel fina celo, lontana utopio. Ni despere sopiras Kuklandon, la Edenon, nelaborujon, kie ni rajtas simple pigradi senĝene, kie la mono laboras por ni kaj permesas al ni karnavale diboĉi.

Sed ĝuste kiam la pakto plenumiĝas, la paradokso malkaŝiĝas. Kiam la investaĵaro sufiĉe dikiĝas por nin vivteni, ni glorie marŝas ne paradizen sed buĉejen. Ni danĝere riskas transformiĝi en (kiel dirus Zaratuŝtro) la “Lastan Homon”, tio estas homo, kiu ne plu kreas, evitas riskojn, nur brakumas la sekurecon de siaj aktivaĵoj kaj sate okulumas sian mortigan komforton aĉetitan per lia propra vivo.

Kaj precize je tiu silento, nin atakas vertiĝo. Sartro avertis nin, ke la vera angoro naskiĝas ne el niaj katenoj, sed el nia absoluta libereco. Dum la senkompata rado de salajrata laboro niajn tagojn strikte diktas, ni perfektan pretekston havas por ne alfronti nin mem.

Tamen, kiam vanuas la financa devo, anksio ekdeĵoras. Sen la ekskuzo “devi perlabori ĉiutagan panon”, ni riskas konfronti la saman ekzistadisman teruron, kiu frapis Ivanon Iljiĉ sur lia mortolito: la timigan suspekton, ke post plenumado de ĉiuj sociaj reguloj kaj atingado de burĝa respekto, nia ekzisto estas krude malplena. La financa libereco nudigas la farson kaj kondamnas nin inventi nian propran celon.

La ekonomia sendependeco, estu do ne elirbileto el la realo, sed pasporto al pli pura vivcelo. Temas ne pri monakumulado por fuĝi de problemoj, sed por konkeri la absolutan privilegion elekti, kiujn problemojn indas suferi. Gape antaŭ mil padoj la libera homo elektu sian deziratan itineron, kie li ĉasu ne trivialan monprofiton, sed vivkialon. **Kiu fuĝas de malfacileco, tiu fuĝas de la vivo mem.** Ni konstruu kaj tiam amu nian destinton (*Amor fati*) eĉ kiam ĝi dolorigas.

Niaj investoj ne estu faŭsta oro, per kiu ni aĉetas nian propran vanuon en inertan trankvilon. La ververa valoro de la riĉeco ne estas aĉeti la rajton fari nenion, sed akiri la aŭdacon agi laŭ niaj propraj kondiĉoj. Same kiel Faŭsto, kiu finfine trovis savon ne en pasiva plezuro, sed en la senĉesa, malfacila klopodo transformi la mondon, ankaŭ ni uzu nian riĉecon, nian tempon, nian vivon por agi, por esperantumi, por pachtali, por grandskale ami. Ni reakiru nian animon el la merkato, farigante finfine mastroj de nia propra libereco.



Okaze de la Internacia Tago de Espero, 12 julio 2026

En la jaro 2025, unuafoje, Unuiĝintaj Nacioj festis la 12-an de julio kiel Internacian Tagon de Espero. Tiu speciala tago estis establita por memori la mondan komunumon, ke Unuiĝintaj Nacioj estis fondita en la jaro 1945 en spirito de optimismo post la amasa detruo de la Dua Mondmilito, kaj kun espero, ke neniam plu la homaro permesu al si esti superita de tia malamikeco kaj krueleco kaj homa suferado. Tiu fervora kredo je paco motivis la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj de la jaro 1945 kaj enkorpiĝis en la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj (1948).

En sia Statuto, Universala Esperanto-Asocio deklaras respekton de homaj rajtoj necesa kondiĉo por la Asocia laboro. La Internacia Lingvo Esperanto portas eĉ en sia propra nomo la ideon de espero. Ludoviko Zamenhof, la fondinto de la lingvo, nomis sin “Esperanto” (homo kiu esperas) kaj plu-

laboris por inspiri parolkomunumon kiu hodiaŭ havas anojn en la plejparto de la mondo. La komunumo laboras por disvastigi reciprokajn komprenon bazitan je samrajteco, instigi komunuman engaĝiĝon por la komuna bono, kaj krei kulturon de paco en mondo ĉiam pli sieĝata de malamikeco kaj miskompreno.

En tiu ĉi epoko de necerteco, ni instigas ĉiujn homojn de bona volo, kaj precipe la Esperanto-komunumon, unuiĝi ĉirkaŭ dialogado, komunuma agado, kaj engaĝiĝo kun la mondo, en espero kaj agado por pli bona, pli paca kaj pli komprenema monda komunumo.



Universala Esperanto-Asocio

Tago de Espero

12 julio 2026



Spektu prelegon de Humphrey Tonkin okaze de la Unua Tago de Espero, en la DLK en Toronto, Kanado:



www.mallonge.net/HumphreyTonkin

La morto de Ivan Iljiĉ: **Flua kaj fidela versio**

De Fernando de Diego

Antaŭ kelkaj monatoj ĝia tradukinto Valentin Melnikov forpasis, ni do honore al li decidis aperigi faman recenzon pri lia traduko. Danke al kanada eldonejo la libro jam estas aĉetebla en Kanado.

La morto de Ivan Iljiĉ (1886) apartenas al la periodo post la religia konverso de Lev Tolstoj, kiam li komencis verki denove fikcian literaturon. Ĝiaj intrigo kaj moralajo estas simplaj kaj memevidentaj, nome, ke la homoj travivas eraran vivon, kaj ke ili devus kondukti en obeo al la simplaj, esencaj leĝoj de la naturo.

En *La morto de Ivan Iljiĉ* sovaĝa satiro kontraŭ la vaneco kaj hipokriteco de la konvencia vivo kombiniĝas kun potenco, simbola prezento de la izolo de la homo en ties lukto kontraŭ la morto.

Ivan Iljiĉ estas ordinara persono, nek modelo de virto nek aparte libermora, iu familia homo kun filoj kaj edzino, ne ĉiam en bonaj rilatoj kun ŝi. Tra sia malsano, kiu originas el vulgara akcidento pro falo de sur ŝtupetaro, li konscias iom post iom pri la falso de siaj vivo kaj ambicioj. La izoligo, kiun la malsano trudas al li, la bariero el hipokriteco, kiun familianoj kaj kuracistoj starigas ĉirkaŭ li, kaj liaj fizikaj kaj animaj suferoj kondukas lin laŭgrade al la rekono de la konkreta profilo de la morto, ne nur ĝeneralsence, sed ankaŭ kiel io intime persona fontanta el lia fizika misfarto.

Komence li deziris nur reveni al sia agrabla vivo normala kaj — kvankam en la lastaj tagoj de sia malsano li krias en sia agonio: “Mi ne volas!”, sciante ke li devas morti — ĉe la fino li vidas la lumon en la fundo de la nigra sako, en kiun ŝovadis lin nevenke-



La Morto de Ivan Iljiĉ

Lev Tolstoj

Tradukis Valentin Melnikov

bla forto, kaj li diras en si mem: “Finiĝis la morto! Ĝi ne plu ekzistas!”

Ĉiuj homoj ĉirkaŭ li estas hipokritaj kaj egoismaj. Lia edzino memoras nur kiel ŝi suferis dum lia agonio; lia filino pensas sole pri la prokrasto de sia edziniĝo; liaj kolegoj kalkulas la eblajn promociojn, kiuj estiĝos sekve de lia forpaso; kaj la kuracistoj riveliĝas aparte malhumanaj kaj senskrupulaj.

La detaloj, kiel ĉiam ĉe Tolstoj, aperas superbe konkretaj kaj realismaj sed kun la sola celo, ke ni konsciu, same kiel Ivan Iljiĉ, ke ni ĉiuj — vi, mi kaj la ceteraj — estas mortaloj, kaj ke la vivo de granda parto de la civilizitaj homoj egalas al kruda mensogo, ĉar ili ignoras, maskas la nigran fonon, la metafizikan abismon, la konstantan realon de la Morto.

La esperanta traduko laŭdindas. Kelkaj stilaj malgataĵoj, misuzo ie tie de la artikolo — kio kompreneblas, kiam oni tradukas el senartikola lingvo — kaj prefero por la nePIVa sulkigi anstataŭ la zamenhofa sulki estas apenaŭ makuletoj en la cetera flua kaj fidela versio de Valentin Melnikov.



Ligilo:

www.mybook.to/LaMortodelvanIlji

Nova novelaro kaj nova retbutiko

De François Bolduc

INTERKULTURA
INK
NOVELO-KONKURSO

Se vi partoprenis la Montrealan Universalan Kongreson en 2022, vi eble memoras ke tiuokaze estis lanĉita la unua novelaro de la tiam ĵus kreita Interkultura Novelo-Konkurso (INK). Ĉi tiu libro titoliĝas “Amo, tuso kaj forpaso”, kaj ĝi estis donita al ĉiuj kongresanoj, do eble ĝi ankoraŭ troviĝas en via propra biblioteko!



De tiam, INK daŭrigis kun jaraj eldonoj. La plej lasta eldonaĵo de la konkurso estas “Kie vojoj renkontiĝas”, pri la temo de artefarita intelekto el la kvara eldono de INK. Ĝi enhavas 27 novelojn pri AI de aŭtoroj el 14 landoj.

Bobelarto nun havas propran retbutikon ĉe bobelarto.ink/

butiko, kie legantoj povas aĉeti ĉiujn novelarojn de la Interkultura Novelo-Konkurso. Krom la ĵus lanĉita “Kie vojoj renkontiĝas” (INK-4), disponeblas ankaŭ “La sekreta vivo de miaj najbaroj” (INK-3), “La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj” (INK-2), kaj “Amo, tuso kaj forpaso” (INK-1).

Bobelarto invitas vin profiti, ĝis la fino de la somero, rabaton de 15% ĉe ajna aĉeto en la butiko kun la kodo “KEA15”.

INK-5: premio-ceremonio en Graco

Dume, la kvina eldono antaŭeniras. La gajnintoj de la kvina eldono de INK estos anoncitaj la 2-an de aŭgusto 2026 dum la 111-a Universala Kongreso de UEA en Graco, Aŭstrio. La rezultoj estos anoncitaj ankaŭ en YouTube kaj en la Bobelarto-retejo. La kvina eldono ricevis rekordan nombron de 2,247 konkursaĵoj pri la temo “La detalo kiu ŝanĝas ĉion”. La finalistaj noveloj estas nun tradukataj kaj redaktataj por krei la novelaron, kiu estos publikigita en aprilo 2027.



INK-6: Proksime al la celo

La sesa eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso akceptis kontribuantojn ĝis la 30-a de junio 2026. La temo estis “Proksime al la celo”, kaj ĉirkaŭ 2,000 konkursaĵoj estis ricevitaj! Baldaŭ estos lanĉita la sepa eldono de la konkurso! Por pli da informoj, vizitu: bobelarto.ink/konkurso.





Enigmo de la vojaĝontaj E-istinoj

Kvin kanadaj esperantistinoj volas ĉeesti la ĉijaran Universalan Kongreson, ĉiu havas diversan ĉefkialon ĉeesti UK-on kaj vojaĝos dum malsama nombro de tagoj. Ĉiu el ili havas diversan plej ŝatatan trinkaĵon, volas aĉeti ion diversan el la libroservo kaj aĝas malsame. **Kiu plej ŝatas trinki kafon?**

- La esperantistino kiu volas aĉeti la flagon vojaĝos dum 15 tagoj.
- Klara estas la kvara en la foto (de maldekstre dekstren).
- La 26-jaraĝa vojaĝos dum tuta monato.
- Tiu kiu aĉetos la kajeron estas en la foto ie inter la plej aĝa kaj tiu kiu preferas sukron, en tiu ordo.
- Tiu je la kvina pozicio plej ŝatas lakton.
- Liza volas iĝi prezidantino de TEO (Teamanta E-organizo).
- Kiu aĉetos skribilon vojaĝos 25 tagojn.
- La unua virino ĉeestas la kongreson ĉefe por turismi.
- Vilma, kiu estas la plej aĝa, estas ekzakte maldekstre de la teo-amantino.
- La esperantistino kiu vojaĝos nur 15 tagojn iros al UK ĉefe pro ties muziko.

- Tiu je la kvara pozicio konfesas ke ŝi nur vojaĝas por aŭskulti interesajn prelegojn.
- Nadja aĝas 25 jarojn kaj vojaĝos 20 tagojn.
- Pro sia laboro, 23-jaraĝa Ana nur povos vojaĝi 15 tagojn.
- Tiu 24-jaraĝa kiu aĉetos libron ĉiam preferas trinki sukron.
- La lakto-trinkanto estas ekzakte dekstre de tiu kiu nur vojaĝos 10 tagojn.
- Nadja kiu estas je iu ekstremo de la foto, aĉetos ĉemizon.
- Tiu kiu amas prelegojn troviĝas ie inter la virino kiu iras al UK nur pro ties bufedo kaj tiu kiu vojaĝas ĉefe por renkonti E-amikojn, je tiu ordo.
- La esperantistino de la mezo ĉiam preferas trinki nur akvon.


Amuzaĵoj

VERTIKALE


1. Oni elbatas ____on per ____o
2. Laboro kaj pacienco kondukas al ____o
3. Restu ____o ĉe via laboro.
5. Ofta ____o, malplena kesto
6. Kia la ____o, tia la ĉapo
8. Kiu frue leviĝas, facile ____as
9. Laboro finita, ripozo ____ita

HORIZONTALE


2. Du militas — tria ____as
4. Ne ŝovu la ____on en fremdan vazon
5. Dirite, ____ite
6. Kiam ____o promenas, la musoj festenas.
7. Kio estas lernita, ne estas ____ita.
10. Mono estas ____o, mono estas leĝo



**Ĉu vi denove malfruas?
Kio okazis ĉi-foje?**



**Ho, sinjoro, vi tute ne
kredos.**



Ho ve, fi al mi!



Kanada scienco

Kosmo Sen “Malluma Energio”

Ĉu eblas, ke unu el la plej grandaj misteroj de la astrofiziko ĵus estis solvita de 14-jara studento? Liam Desre, gimnaziano el Kingston, Ontario, lastatempe gajnis la plej altan premion en la Kanada Scienca Foiro per revolucia ideo: modelo de la universo, kiu tute forigas la bezonon de malluma energio.




Dum jardekoj, sciencistoj uzis tiun misteran energion por klarigi kial nia universo konstante kaj akcelite pligrandiĝas. Tamen, la projekto de Liam uzas simplajn kaj pruvitajn principojn de termodinamiko por simuli ĉi tiun kosman vastiĝon sen bezono de fantomaj fortoj. Lia modelo sugestas, ke la ekspansio povus esti natura sekvo de varmo-ŝanĝoj en la spaco. Ke tiel juna esploristo kapablis proponi matematike koheran alternativon al unu el la kolonoj de la moderna kosmologio, provas, ke scienca genio ne konas aĝon.



Legi plie ĉe

www.mallonge.net/big-idea-on-the-universe

La Aŭda Galaksio



Profunde en nia kapo kaŝiĝas strukturo, kiu imitas la grandiozecon de la kosmo. Esploristoj de la Universitato Laval ĵus sukcesis fari mirindajn mikroskopajn bildojn de la interna orelo dum ĝia disvolviĝo. Kion ili trovis? La koklea dukto – la

organo respondeca pri nia aŭdkapablo – volviĝas laŭ ekzakte la sama logaritma spiralo kiel gigantaj formacioj en la spaco, kiel la fama Vortica Galaksio (NGC 5194).

Ĉi tiu malkovro, nomita “La Aŭda Galaksio”, estas multe pli ol nur vida kuriozaĵo. Desegnante kiel precize formiĝas ĉi tiu spiralo ĉe la ĉela nivelo, la kanadaj sciencistoj nun malfermas novajn eblojn por kompreni kaj trakti denaskan surdecon. Ĉi tiuj bildoj permesos al esploristoj disvolvi novajn terapiojn por protekti aŭ eĉ regeneri la treege fragilajn sensajn ĉelojn, kiuj ebligas al ni sperti la simfonion de la vivo.

Legi plie ĉe




www.mallonge.net/galaxy

“Blanka Hidrogeno” sub la Kanada Ŝildo

La serĉado de pura kaj senfina energio eble ĵus trovis sian Sanktan Gralon rekte sub niaj piedoj, specife sub la masiva Kanada Ŝildo. Geologoj de la universitatoj de Toronto kaj Otavo ĵus konfirmis la ĉeeston de profundaj naturaj kuŝejoj de “blanka hidrogeno”.

Kial tio estas tiom grava? Malkiel “verda” aŭ “blua” hidrogenoj, kiuj postulas enormajn kvantojn da elektro kaj kompleksan industrian infrastrukturon por fabrikiĝi, blanka hidrogeno estas kreata nature de la Tero mem. Ĝi povas esti eltirita simile al natura gaso, sed kun kerna diferenco: kiam oni bruligas ĝin por produkti elektron aŭ movi veturilojn, la sola kromprodukto estas pura akvo. Ĉi tiu malkovro sugestas, ke la subtero de Kanado eble





kaŝas gigantajn rezervejojn de brulaĵo centprocente renovigebla, kio povus draste akceli nian transiron for de fosiliaj brulaĵoj al pli verda estonteco.

Legi plie ĉe



www.mallonge.net/white-hydrogen



Lumen eldonas dufoje jare KEA, P.O. Box 2159, Sidney, BC, Kanado V8L 3S6
<www.esperanto.ca/kea/>
Lumo ("light") is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association
Lumo ("lumière") est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

El la Arĥivoj - antaŭ 25 jaroj

Vi povas trovi multajn malnovajn numerojn de Lumo (ekde la jaro 1902) en la retejo de KEA. Jen nia elekto de la printempa/somera numero de 2001 - antaŭ ekzakte 25 jaroj. La tiama redakoro de Lumo estis Geoffrey Greatrex, la nuna prezidanto de KEA.

Lingva Politiko kaj Impostoj

De Bruce Arthur

Lumo #1 (Printempo/Somero) 2001

Dum la pasintaj kelkaj jaroj mi korespondis kelkfoje pri Esperanto kun la "Canadian Taxpayers' Federation" (CTF). Tio estas organizaĵo kiu laboras por reprezenti impostpagantojn en Kanado, klopodante malpliigi elspezojn de registaroj, eĉ lingvajn elspezojn. Ĉi tiu artikolo priskribas la rezultojn de mia korespondado.

CTF kontraŭas altajn impostojn kaj defecitojn, kaj ĝi plendas kiam registaroj malŝparas monon. Ĝi ankaŭ volas plidemokratiigi Kanadon. La gazeto de la organizaĵo havas proks. 80 000 abonantojn. CTF havas sekcion en ĉiu provinco okcidente de Kebekio, kaj ĝi havas plurajn dungitojn.

En antaŭaj jaroj, la gazeto de CTF enhavis kelkajn artikolojn pri lingvaj kostoj en Kanado. Du gravaj artikoloj aperis en 1994 kaj unu en 1996. La artikoloj klarigis la lingvajn kostojn de la federacia registaro - por tradukado, instruado kaj simile. La artikoloj plendis ke lingvaj kostoj estas tre grandaj, kaj ili proponis, ke la registaro evitu grandan parton de ĉi tiuj kostoj. Tamen la ideoj de CTF estis tre malklaraj al mi. Ekzemple, CTF diris, ke la registaro povus elspezi multe malpli se ĝi disponigus servojn

en ambaŭ oficialaj nur tie, kie estas bezono. Mi ne sciis, kiel ĝi difinas "bezono". Ĝi ankaŭ diris, ke multaj kanadanoj kredis, ke oficiala dulingvismo estas disiga. Malklaris al mi, ĉu CTF opiniis ke ĝiaj ideoj estas malpli disigaj.

Mi skribis leteron al CTF por peti klarigojn pri iliaj ideoj. Mi ankaŭ skribis pri Esperanto kaj ĝiaj avantaĝoj. Oni povas instrui Esperanton por malpli granda kosto ol alian lingvon. Kaj se oni uzus Esperanton kiel neŭtralan laborlingvon, oni povus eviti iom da tradukkostoj. Mi ricevis de CTF ĝentilan leteron, kiu diris ke Esperanto estas studinda ideo. Tamen CTF apogus ĝin nur se analizo montrus, ke la gajnoj estus pli grandaj ol la kostoj. Mi reskribis por demandi ĉu CTF havis analizon pri la gajnoj kaj kostoj de siaj tiamaj ideoj. Mi ankaŭ denove petis klarigojn pri la artikoloj, ĉar la unua letero ne respondis al miaj demandoj. Tamen CTF neniam respondis al mia letero.

Mi skribis al CTF ankaŭ pri la Unuiĝintaj Nacioj. Artikolo en la gazeto de CTF en 1996 diris, ke la UN malŝparas monon, sed la artikolo ne donis ekzemplon. Mi demandis, ĉu CTF opiniis ke la lingvaj


kostoj de UN estas ekzemplo de malŝparado. Neniu respondis. Mi pensis ke estus bone sendi al CTF analizon pri la eventuala uzo de Esperanto en la UN. Tamen ŝajnis al mi ke tia analizo ne ekzistas. Sed en 2000 mi ricevis la libron Esperanto en la Moderna Mondo, kaj mi vidis ke ĝi havas artikolon pri tiu afero. La artikolo estis iom maldetala kaj malnova, sed mi opiniis ke ĝi estas studinda al iu, kiu volus reformi elspezadon en la UN. Mi demandis min ĉu mi donu ekzempleron de la libro al CTF. Mi timis ke CTF forĵetus la libron sen legi ĝin, kaj mi ne volis vidi tian malŝparon: mi malamas vidi malŝparadon. Mi decidis skribi al CTF leteron, proponante ke mi donos al ili la libron, se ili petos ĝin. Mia letero ankaŭ mallonge priskribis la analizon en la libro, kaj ĝi memorigis ke CTF interesiĝis pri analizo pri la gajnoj kaj kostoj de Esperanto. Tamen neniu respondis al mia letero.

En 1998 CTF gastigis en Kanado mondan kongreson de impost-pagantoj. Mi skribis al CTF por proponi ke Esperanto estus bona temo por la kongreso. Partoprenantoj el diversaj landoj povus kompari lingvajn kostojn en siaj hejmlandoj kaj paroli pri lingvaj kostoj de interregistaraj organi-

zaĵoj, kiel la UN. Tamen CTF ne respondis al mia letero, kaj la kongreso okazis sen diskuto pri lingvoj.

Konklude, miaj leteroj ne konvinkis al CTF apogi Esperanton. Mi ne certas pri la kialo. Sed aliflanke, post miaj leteroj, la gazeto de CTF diris preskaŭ nenion pri lingvaj kostoj. Tio verŝajne estas nur koincido, sed eble estas rezulto de miaj leteroj. Ĉiukaze, mi min demandas, ĉu CTF ankoraŭ opinias ke la kanada registaro malpliigu siajn lingvajn kostojn je multaj milionoj da dolaroj. Ĉu CTF ankoraŭ kredas ke tio eblas? Ĉu ili ankoraŭ interesiĝas pri la demando? Se ne, kial? Mi ne scias.

Postskribe, mi volas aldoni ke mi skribis ankaŭ al alia organizaĵo, la ‘Taxpayers Associations International’. Tio estas mondskala organizaĵo al kiu aliĝas CTF kaj aliaj landaj asocioj de impost-pagantoj. Ties sidejo estas en Svedio. Mi ricevis rapidan kaj ĝentilan respondon. La letero diris ke lingvaj kostoj interesas la organizaĵon, sed ili ne scias, ĉu Esperanto estas solvo. Ili mem komencis uzi unu solan laborlingvon, sed ili elektis la anglan. (Mi supozas ke la instruon koston pagas registaroj, ne la organizaĵo mem.)



Esperanto atingas novajn aŭskultantojn nordamerike

De Quintyn Bobb

Gvidantoj de Esperanto-USA partoprenis en radioprogramo de Ideastream Public Media por diskuti la historion de Esperanto, kaj la ĉi-jaran Usonan Landan Kongreson en Klevlando.

“Sono de Ideoj”, la ĉiutaga publika aferprogramo de Ideastream Public Media intervjuis Esperanto-USA kiel parto de konversacio pri Esperanto kaj la Landa Kongreso de la organizaĵo en Klevlando. Kune, ili diskutis la originojn de Esperanto, ĝian ligon al Klevlando, kaj la komunumon, kiu daŭre kreskas.

Ili helpas alporti Esperanton ekster Esperantujo kaj en publikan konscion, kie tiuj, kiuj ne parolas Esperanton, povas renkonti la lingvon, esprimi scivolemon, kaj vidi kial la lingvo ankoraŭ gravas. Brandon Sowers priskribis Esperanton kiel “duan lingvon, kiun ĉiu povus lerni”, kreitan por helpi homojn superi limojn.

Amanda Schmidt diris, ke Esperanto “simple alklakis” ŝin. Jeremy Genovese priskribis similan senton de konekto, memorante retan konversacion inter parolantoj el Irano, Egiptujo kaj Israelo; li diris: “Esperanto, jen la sola loko, kie io tia povas okazi.”

La radioprogramo ankaŭ esploris la longan rilaton de Klevlando kun Esperanto, inkluzive de naciaj kunvenoj kiuj okazis en la urbo en 1924 kaj 1938. La ĉi-jara kunveno daŭrigas tiun historion, denove kunigante lernantojn, parolantojn, kaj subtenantojn de la lingvo en Nordorienta Ameriko.

Spektu la intervjuon ĉe:



www.mallonge.net/esperanto-en-Cleveland

La 8a Usona Bona Film-Festivalo Komenciĝas

Oficiale komenciĝas la 8a Usona Bona Film-Festivalo (UBFF), internacia filmkonkurso kiu festas la kreemon, diversecon, kaj la tutmondan komunumon de Esperanto.

Ekde sia lanĉo, la konkurso inspiris filmfaristojn el la tuta mondo krei originalajn mallongajn filmojn en Esperanto, lingvo kreita en 1887 por helpi homojn komuniki trans kulturaj kaj lingvaj limoj.

La konkurso estas malfermita al ĉiuj, kaj partopreno estas tute senpaga. Por konkursi, filmoj devas:

- esti malpli ol kvar minutojn longaj
- esti tute en Esperanto
- enhavi almenaŭ dek unikajn parolatajn Esperanto-vortojn
- inkluzivi la ĉi-jaran postulatan rekviziton: ringo

Kvin ĵurianoj taksos la filmojn kaj aljuĝos monpremiojn al la dek plej elstaraj filmoj. La limdato por sendi filmojn estas la 1a de oktobro 2026.



Unua premio: \$1200



Dua premio: \$800




Tria premio: \$600



Kvara ĝis deka premio: po \$200

Ĉiuj bonvenas, de spertaj filmfaristoj ĝis novaj komencantoj, partopreni kaj montri sian kreemon al la tutmonda Esperanto-komunumo.



Kiel testamenti al KEA aŭ ESK

De Geoffrey Greatrex

Bona maniero subteni Esperanton en Kanado estas donaci monon al la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kaj/aŭ la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) per via testamento. Ne temas pri giganta sumo – eĉ kelkaj miloj da dolaroj povas signife helpi la asocion post via forpaso.

Donaci monon al KEA aŭ ESK en testamento estas sufiĉe facila afero. Ni rekomendas ke oni vortumtu tian testamenteron kiel sube indikite. Rekomendindas doni plenajn detalojn pri la asocio por faciligi la taskon de la plenumanto, eventuale estus saĝe aldoni la retejon de KEA, esperanto.ca aŭ de ESK esperanto.qc.ca. Samtempe ni konsilas, ke vi informu KEA aŭ ESK, se vi tiel agas – denove por faciligi la plenumon de la testamento (kaj por ke la asocio povu plene danke vin).

Anglalingva versio (KEA):

“I give, devise and bequeath [insert % or amount] to **Kanada Esperanto Asocio**, a Canadian charity with Registration # **118977487 RR 0001** at mailing address **198 Banbrooke Crescent, Newmarket, Ontario, L3X 2W6** and e-mail informo@esperanto.ca”

Franglingva versio (KEA):

Je donne, lègue et transmets [inscrire le pourcentage ou le montant] à **Kanada Esperanto Asocio**, organisme de bienfaisance enregistré au Canada, numéro d'enregistrement **118977487 RR 0001**, ayant son adresse postale au **198, Banbrooke Crescent, Newmarket (Ontario) L3X 2W6**, et son adresse électronique informo@esperanto.ca.

Anglalingva versio (ESK):

“I give, devise and bequeath [insert % or amount] to **Société québécoise d'espéranto**, a Canadian charity with Registration # **120301536 RR 0001** at mailing address **6595 rue Briand, Montréal, QC, H4E 3L4** and e-mail informo@esperanto.qc.ca.”

Franglingva versio (ESK):

Je donne, lègue et transmets [inscrire le pourcentage ou le montant] à la **Société québécoise d'espéranto**, organisme de bienfaisance enregistré au Canada, numéro d'enregistrement **120301536 RR 0001**, ayant son adresse postale au **6595, rue Briand, Montréal (Québec) H4E 3L4**, et son adresse électronique informo@esperanto.qc.ca.



Josefo Carrillo

De Jed Meltzer

Estas mia trista devo sciigi al vi, ke lastatempe forpasis tre amata membro de nia klubo, José (Josefo) Carrillo. Josefo devenis el Portoriko, kie li komencis studi en la Universitato de Mayagüez je la aĝo de 16. Li diplomiĝis en la fako de komputila scienco kaj elektra inĝeneriado. Diplomiĝinte, li translokiĝis al Sankta Tomaso en la Usonaj Virgulin-insuloj, kie li fariĝis instruisto de kalkulo ĉe All Saints Cathedral School. Li laboris tie dum du jaroj, eklaboris ĉe Scotiabank en Portoriko, kaj poste translokiĝis al Salvadoro por pliaj du jaroj. En 2000, li translokiĝis al Kanado, kun sia novedzino Leah. Li daŭre laboris en la organizaĵo de Scotiabank en diversaj alt-nivelaj manaĝeraj postenoj ĝis sia emeritiĝo en 2022. Li estis agnoskita kiel gvidanto kaj en sia profesia vivo kaj en sia persona vivo. Li estis vera entuziasmo pri siaj diversaj amoj, inkluzive sian familion, vojaĝadon, ŝakon kaj Esperanton.

Unu el liaj plej karaj ŝatokupoj estis la instruado de Esperanto, kiun li faris dum multaj jaroj ĝis la fino de sia vivo, eĉ dum la lastaj tagoj de sia plurmonata malsano. Li estis aparte amata de siaj amikoj kaj lernantoj. Kiel ekzemplo de lia lerteco kiel instruisto kaj amanto de la vivo, li preparis gvidilon pri la terminoj de kegloludado, preparitan por la grupa vizito de nia klubo al kegloludejo por Paralela Universo en 2024.

Aldona noto: En Lumo 2025-1 (p.46), aperis Josefo kiel la homo, kiu savis kolekton da esperantaj libroj destinitaj al la rubejo.



Josefo kaj lia edzino Leah



Probal Dasgupta

De Marc van Oostendorp

(Originele verkita por novaĵretejo)

vorto estas neŭtrala aŭ memstara: ĉiu vorto kiun oni elparolas ligiĝas per miloj da fadenetoj al aliaj vortoj kaj al la literatura tradicio – inkluzive de buŝaj tradicioj de popoloj sen skribo – en kiu ĝi naskiĝis. Paroli signifas eniri tiun teksaĵon, ne stari ekster ĝi.

La saman malsimplecon li portis en la Esperanto-movadon, al kiu li donis grandan parton de sia vivo. Li vidis en la Esperanto-komunumo modelon de intertraktado inter lingvoj kaj literaturoj, komunumon kiu jam preskaŭ 140 jarojn praktikas la arton konstrui ponton inter unu tradicio kaj alia. Li parolis pri "agema najbarado": anstataŭ konvinki la mondon per argumentoj, oni montru per faroj ke alia maniero kunvivi eblas, kaj esperu ke la najbaroj iam rimarkos ĝian dezirindecon kaj komencos imiti.

Dasgupta aliflanke ne estis homo kiu kaŝiĝis en iu teorio. Li estis engaĝita barata civitano, kaj li uzis sian pensadon por rigardi kritike sian propran landon. Lia esperantismo kaj lia barateco ne estis du apartaj aferoj sed unu sinteno: la konvinko ke neniuj lingvoj, neniuj kulturoj, neniuj popoloj rajtas prezenti sin kiel la neŭtralan mezuron de ĉiuj aliaj.

Probal Dasgupta kredis ke ideoj gravas eĉ kiam ili estas malfacilaj, ke lingvo estas loĝejo kaj ne nur ilo, ke oni ŝuldas al la mondo sian plej zorgan pensadon kaj ne sian plej rapidan opinionon.

Profesoro Probal Dasgupta (1953–2026) longtempe estis grava forto en la Esperanto-movado, interalie kiel prezidanto de Universala Esperanto-Asocio inter 2007 kaj 2013 kaj prezidanto de la Akademio de Esperanto inter 2016 kaj sia morto. Li naskiĝis en 1953 en Kolkato, en familio kie la intelekto estis hejma aero: la patro historiisto, la patrino socia psikologo kaj verkistino.

Li estis homo por kiu pensi estis maniero vivi, kaj kiu kredis – kontraŭ ĉiuj pruvoj de nia tempo – ke subtila ideo valoras la penon esti dirita malgraŭ tio ke malmultaj kapablos tuj sekvi ĝin. Por li, neniuj

Anoncoj



Venontaj eventoj 2026

1-8
aŭgusto

111-a Universala Kongreso de Esperanto

“Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo”

uk.esperanto.net/2026



9-16
aŭgusto

82-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)

“Naturo el la homaj okuloj”

ijk2026.tejo.org



10-12
oktobro

66-a Argentina Kongreso de Esperanto (AKE - 2026)

“Esperanto-organizaĵoj en la 21-a jarcento: Ĉu la E-komunumo bezonas ilin?”

www.eventaservo.org/e/cea101



30-2
oktobro- novembro

28-a Kolombia Kongreso de Esperanto

www.kongreso.esperanto.co



13-16
novembro

16a Meksika Kongreso de Esperanto

“Meksiko en Mondaj Ŝanĝoj”

www.eventaservo.org/e/16aMEK



21-24
majo 2027

Mezkanada renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo)

2027

www.mekaro.ca




Esperanto-kurso

Senpaga Esperanto-kurso organizita de kolombia kanadano okazos denove senpage kaj virtuale.

Ĝi havos bazan nivelon por hispan- kaj indonezi-parolantoj, kaj mezan nivelon por ĉiuj (la meza nivelo estos rekte instruita en malrapida kaj facila Esperanto)

Eblas aliĝi tute senpage al tiu 8-semajna kurso, en kiu ĉiutage io okazos, ĉu lecionoj, ludoj, legoklubo, prelegoj, ekzercoj, kaj multe pli.

Ankoraŭ ekzakta informo estas konfirmota, sed baldaŭ ĉio troveblas ĉe: www.esperantokurso.com





Lumo

